

INTERNACIA

JURA

REVVUO

B·U·D·A·P·E·S·T

1968



6

INTERNACIA JURA REVUO

ORGANO DE LA INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ

III. Jaro. ☆ No. 6.

Januaro—Marto 1968.

Al la Leganto

Jen, en trian jaron paŝas nia Internacia Jura Revuo. Pluan aperigon postulas unue ĝia sensanĝa celo: utiligo de la Internacia Lingvo en la praktiko, precipe inter la juristoj. Due ties pozitiva sperto, ke la esperantistoj - juristoj bonvole, eĉ ĝoje akceptis kaj rekonis ĝin. Ilia eĥo estas ĝojiga. Tiu situacio devigas la redaktoron kaj eldonanton al plua fortostreĉo por kontentigi tiurilatan deziron de la legantoj.

En sia vivo de la Internacia Jura Revuo jen malfermiĝis nova ĉapitro. Ĝi aperas presite, kaj tiel sinanoncas ĉe la leganto. Komprenoble la redaktoro ankaŭ pli riĉan enhavon volas doni. Sed al la realigo de tiu ĉi intenco nepre estas necesa pli ol ĝisnuna aktiva agado de ĉiu membro de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj ĉiu leganto de la Revuo.

Sian taskon kaj celon IJR nur tiam povas plenumi, se ĝi amplekse peras la konojn pri la juraj institucioj de diversaj landoj, kaj el ĉiu sfero de la socio kaj ĝi donas informon pri ties politika-jura solvo kaj fenomenoj.

La sfero kaj diversaj terenoj de la jurisprudenco, ĝia stato en la diversaj landoj garantias al la aŭtoroj la temon, kiuj nepre interesas ne nur la juristojn ĉu teoriajn, ĉu praktikajn de ĉiu lando, sed nian ĉiun leganton.

Por la sukceso de la Revuo estas necese, ke la redaktoro konstante ricevu taŭgajn artikolojn, eĉ verkitaĵajn tiajn temojn, kiujn, kara leganto, vi mem serĉas kaj volonte legas en la Revuo.

La Redaktoro



Prezidanto de IEAJ

Ivo Lapenna, naskiĝis en Split, Jugoslavio, en la jaro 1909; juraj studoj kaj doktoriĝo en la Jura Fakultato de la Universitato de Zagreb; docento kaj poste profesoro pri Publika Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj (1946—1949); eksperto pri Publika Internacia Juro ĉe la Packonferenco en Parizo en 1946; advokato-konsilisto antaŭ la Internacia Kortumo en Hago en 1947; kunlaboranto de la Centre National de la Recherche Scientifique en Parizo de 1950—1954; nun profesoro (reader) pri Kompara Sòveta kaj Orienteŭropa Juro en la Universitato de Londono.

ALVOKO de la Prezidanto de IEAJ

Tre estimataj kaj karaj Kolegoj!

La Estraro jam plurfoje rekomendis, ke ĉiuj membroj de nia Asocio fariĝu Membro-Abonantoj de UEA, kaj samtempe fakdelegitoj pri juro. En la nuna momento nia Asocio havas 157 membrojn en 31 landoj. Laŭ la Jarlibro de UEA por la jaro 1967 ni havas entute nur 38 fakdelegitojn pri juro en 19 landoj. Tio signifas, ke ĉ. 120 membroj de nia Asocio ankoraŭ ne estas fakdelegitoj pri juro.

La fakdelegitara reto de UEA estas unika en la mondo. Ĝi ebligas multflankajn kontaktojn inter samfakuloj kaj faciligas fakajn servojn. Mi mem en la lasta jaro faris almenaŭ 10 fakajn servojn por kolegoj aŭ nejuristoj de aliaj landoj. Aliflanke, mi mem ricevis tre utilan helpon de kolegoj en aliaj landoj. El ĉiuj vidpunktoj — nome el tiu de la interesoj de nia Asocio, de Esperanto kaj de ĉiu unuopa kolego — estas do tre utile, ke kiel eble plej multaj kolegoj funkcii kiel fakdelegitoj pri juro en la kadro de UEA. Listo de ĉ. 150 fakdelegitoj pri juro en 31 landoj estus impona kaj prezentus grandajn eblecojn por utiligo de la Internacia Lingvo por fakaj celoj. Tial mi tre varme rekomendas al ĉiu kolego aliĝi al UEA en la kategorio de Membro-Abonanto, kaj fariĝi fakdelegito pri juro.

La kotizo de UEA por Membro-Abonanto estas gld. 25, aŭ 7,50 USA dolaroj, aŭ egalvaloro. En ĉiu lando troviĝas ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA, al kiuj oni pagas la kotizon, de kiuj oni ricevas la respondilojn por fakdelegito kaj ĉiujn eventualajn aliajn informojn. La kotizojn oni povas ankaŭ pagi rekte al la Centra Oficejo de UEA: Universala Esperanto-Asocio, 176, Nieuwe Binnenweg, Rotterdam 2, Nederlando.

Ankaŭ el alia vidpunkto estas tre rekomendinda observi la supran peton. En tiu jaro UEA fariĝas 60-jara. La Estraro de UEA decidis ne celebri tiun eventon per retrorigardo al la pasinteco, sed prefere fortiki la Asocion ĝis maksimumo, por ke ĝi povu ankoraŭ pli sukcese plenumi siajn multnombrajn taskojn. Apartan atenton UEA dediĉas nun al vastigo de la lingvo en fakaj medioj, kaj al ĝia utiligo por tuta laboro, interalie per aliĝo al UEA kaj akcepto de la funkcio de fakdelegito.

Esperante, ke tiu ĉi alvoko trovos favoran eĥon, kaj ke ĉiu el vi, kiu ankoraŭ ne estas fakdelegito, tuj aliĝos al UEA, kaj transprenos tiun funkcion,

mi restas kun kolegaj salutoj
sincere via

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Evoluo de la Jura Sistemo en la Hungara Popolrespubliko

1. La valida juro en 1945, jaro de la Liberiĝo, en Hungarujo havis eksterordinaran karakteron. El jureforma vidpunkto, pli granda parto de la valida juro (ŝtatjuro kaj plejgranda parto de la privatjuro) estis neskribita, sed kutimo-juro. Tiu-ĉi juro havis grandan forton al la aplikado. Tion karakterizis tiu situacio, ke kvankam ekde komenco de nia jarcento pretiĝis tri projektoj de la privatjuro, tamen el ili eĉ unu ne estis prezentita al la parlamento por levi al leĝo. Post la 1867-a jara aŭstra—hungara „kompromiso” okazis certa kodifo sur la tereno de la kriminala juro, ĉe juroj de komercado, de industrio, de familio kaj de la kriminala proceduro. La karakteron de valida juro komplikis poste nur en parto la pli grandnombra reguligo, speciala modifo, kiu certajn problemojn kaŭzis. (Ni notas, ke la evoulo de la hungara juro en tiu epoko estis sub rekta influo de la aŭstra kaj germana juraj solvoj.)

En la tempo de Liberiĝo kaj en postaj jaroj, la senvalidigo de tuta materialo de la juro ne fariĝis aktuala, sed tuj okazis la senvalidigo de tiuj leĝoj kaj juraj reguloj, kiuj eksplicite havis kontraŭdemokratajn karakterojn kaj komenciĝis la transformo de ilia enhavo kaj konstruado de tiu demokrata ŝtatorganizo, kiu kapablis doni novan, demokratian enhavon al la transprenitaj juraj normoj.

La demokratigo de la persona kondiĉo en la ŝtata organizo, la partoprenigo de la popolelementoj en la ŝtata administrado, la senvalidigo de faŝismaj leĝoj kaj la establo de ŝtata kontrolo sur la produktado: jen estis la unua etapo de la transformo de nia jura sistemo. La unuaj paŝoj al la demokratigo, sed ankaŭ la postaj, estis naskitaj per la lukto. En la lukto estiĝis novaj leĝoj, dekretoj kaj ediktoj, kiuj leĝigis la alŝtatigon de la produktiloj, krome tiuj leĝoj de la kriminala juro, kiuj servis la defendon de la nova ŝtatpotenco kaj la punigon de la militaj krimuloj. Tiutempe la evoluo de la juro, finfine koncernis la kreon kaj plifortigon de la popola potenco, sed samtempe la transformigo, respektive la novkreado de ceteraj branĉoj en nia jura sistemo, ne okazis. En certaj detaloj la nova teksto en la juroj de familio, de laborafero aŭ de civilo, plejparte ne estis pli, ol la formulo de ĝeneralaj postuloj demokratataj. La specialaj tribunaloj — tribunalo de popolo — estis kreitaj por kondamni la militajn kaj kontraŭpopolajn krimulojn, krome prirespondigi la malamikojn de la popolrespubliko. Apud tiu ĉi leĝofaranta laboro postrestis la transformo de ceteraj tribunaloj kaj la aktivigo de la popolelementoj en ties administrado. Malpli ŝanĝ-

iĝis la procedura juro kaj plejparte restis sensanĝa la malnova privatjuro, escepte ties kelkajn partojn, kiuj transformiĝis pro la alŝtatigo. Pli grandmezura jurfarado ne okazis, nek speciala kodifo. Ĝenerale la malnovaj jurreguloj validis ĝis nova leĝo, kiu senvalidigis la malnovan, aŭ tion oni modifis per nova jurregulo.

2. La turniĝo de jaro 1948—1949 kaj la solidigo de la proletardiktaturo konkretigis tri taskojn en la evoluo de la juro. Antaŭ ĉio, la jura formado de nova ŝtatpotenco konforme al si; efektivigo de la potenco de la laborista klaso; konsekvence la kreado de nova sistemo de ŝtataj organizoj, kaj fine la ekkomenco de konstruado de la socialisma juro por doni pliigon kaj plirapidigon al la evoluo.

a) La nova popoldemokrata Konstitucio voĉdonita en jaro 1949, estis grandsignifa al la jura evoluo de la novtipa ŝtato. La graveco de tiu konstitucio estis despli granda en Hungarujo, ĉar pli frue la lando ne havis skribitan konstitucion. Do, finfine nur surbaze de tiu ĉi konstitucio estis ebla la validigo de la principo de socialisma konstitucieco. En la jaro 1950 la parlamento voĉdonis la leĝon pri la konsilloj — sovetoj —, kiuj estas laŭkoda dokumento de la ŝtatjuro. Ankaŭ en la kreado de la organizo de la ŝtatpotenco ĝi estas grandsignifa. Cetere la konstitucio donis impulsion al la plivigliĝanta evoluo de la juro, ankaŭ al postrestintaj terenoj. De jaro 1949 komenciĝis la partoprenado de la popolaj elementoj en la kriminala juĝado. En tiu ĉi jura tereno efektiviĝis la plurmembra societa juĝado, la partoprenado de la popolaj acesoroj. La nova ĝenerala parto de la Kriminala Kodo estis kreita en jaro 1950, poste en jaroj 1951 kaj 1952 la farado de la Proceduroj de Civila juro kaj de Kriminala juro, krome la Kodo de Laboraferoj. Tiun etapon de la kodifo fermis la Leĝo de Familio en jaro 1952. En tiuj jaroj okazis grava progreso al la kreado de jura sistemo de la lando. Sur tereno de la ŝtatpotenco kaj de la ŝtata administrado farigis nova socialisma sistemo de la organoj: en la juĝado estis kreitaj novaj principoj al la proceduroj: estis surbazigita la kriminala juro, krome estis kreitaj du kodoj, tiuj estas la juroj de familio kaj de laboraferoj.

Tiu periodo estas la unua etapo de la farado de nova juro. Kvankam ke tiu ĉi periodo estis signifa, tamen ĝi ne tuŝis la plej parton de la materiala juro, nek la specialan parton de la kriminala juro, same nek la civilan juron, ne la fakadministradon de la

ŝtadadministrada juro kaj fine organizite ne la justican organizon. Multnombre naskiĝis provizoraj kaj detalreguloj juraj, kiuj helpis la transformigon kaj novbazigon de nia jura sistemo. Sufiĉas jene menci la regularojn pri la organiza interrilato de la entreprenoj, pri la entreprena kontrakto, pri la proceduro de la arbitracia tribunale, aŭ kelkajn part-leĝojn de la kriminala juro; tiel protekto de la sociala proprietaĵo aŭ de la planekonomio. Tamen manke de ĝenerala, ĉiurilata kodifo, la novaj juraj principoj ne havis ĉiukoncarnajn jurajn esprimojn. Tiel ankoraŭ ne estiĝis pli kompleta kaj stabila sistemo de la socialisma juro.

b) La konstruo de la jura sistemo de Hungara Popolrespubliko daŭris en jaroj 1953—1956. Tiujn jarojn karakterizis la denova kompilo kaj kompletigo de la antaŭaj kodoj. La nova teksto de Kodo de la Laboraferoj, la kompletigo kaj modifo de proceduroj de civila kaj kriminala juroj estas datitaj en tiuj jaroj. En jaroj 1953—1954 formiĝis la nova kadro de la justica organizo kaj la nova principo de la juĝado. Tiu-tempe aperis la kompleta Leĝo pri la novtipa Prokuraro. En tiu etapo okazis la kreo de nova leĝo pri Lokaj Konsilioj kaj de nova sistemo pri Balotrajto.

c) Ekde jaro 1957 la agado al la fardo de la jura sistemo en Hungarujo plirapidiĝis. La unuan etapon karakterizis la nova Procedura Kodo de la Ŝtadadministrado, voĉdonita en jaro 1957: estis pretitaj fundamentaj detal-leĝoj en pluraj branĉoj (sferoj) de la juro, okazis la kompleta reguligo de la jura materialo pri la Sociala Asekurado. Efektive ankoraŭ du grandaj taskoj atendis siajn solvojn, estis devigite krei du jurajn abutmentojn de la jursistemo: la novajn **Kodojn** de la **Kriminala** kaj **Civila** juroj. Tiel en jaroj 1959 kaj 1961 estis voĉdonitaj tiuj ĉi du kodoj. Jen finiĝis la unuafoja kodifo de la jura sistemo de Hungara Popolrespubliko. Sed ankoraŭ restis la tasko al novtekstigo de la malnova leĝo pri ŝtadadministrado kaj la kodifo de kelkaj problemoj en tiu ĉi jura branĉo (sfero). Post la efektiviĝo de tiuj taskoj, la jura sis-

temo, kiu preskaŭ tute sendependiĝis de la juro de antaŭ Liberigo estiĝos ankaŭ en sia kompleto kaj formo tute nova sistemo de juro. Decida paŝo estis en tiu evoluado mem la farado de la kodo pri la civila juro, per tiu oni sukcesis elimini la kutimojuron el la jura sistemo de la popoldemokrata Hungarlando. Per tiu efektiviĝis sin la klopodo ekde jaro 1948, naskita dum tiutempa popola revolucio. La kodifo de la kriminala juro havas grandan signifon, ĉar oni sukcesis ŝanĝi pli ol okdek aĝan kodon per nova.

3. La juran sistemon de Hungara Popolrespubliko karakterizas la klopodo, ke en sia tuto estu kodifita juro. Tiu ĉi aĵo des pli estas grandsignifa, ĉar la pli parto de la jursistemo ne estis kodifita kaj siatempe la utilon kaj plenumon de la ĝenerala kodifo akompanis dubo. Tiu-tempe dubo hodiaŭ, per ekzistado de novaj kodoj karakterizintajn socialismon sur tereno de civila juro, la laborafera juro, de familia juro, de kriminala juro, de civila proceduro kaj de kriminala proceduro, jam estas refutita. Sur la tereno de la publika juro ne nur la nova Konstitucio estis kreita, sed ni kreis ankaŭ kelke de aliaj leĝoj, reglamentintajn certajn problemojn. Estas identa la situacio sur la tereno de administrada juro, kie jam estis kreita procedo en formo de kodo kaj en kelkaj sferoj de la administrado, la nova reguligo estas aktuala. Ne estas kodifita la financa juro kaj juro pri produkta kooperativo, sed ankaŭ en tiuj aferoj skribitaj reguloj formas la kompletan juron.

La evolucio de nia jura sistemo do ne estas fermata, ĝi ankoraŭ ne atingis sian finon. La nova situacio, konstanta formiĝo de la sociaj interrilatoj ĉiam alportas pli kaj pli novajn problemojn, kies solvo faras necesa pluan evoluigon de la jura reguligo kaj kodifo.

Rimarko: Nova Kodo de Laboraferoj — Leĝo II. de 1967 —, kiu nur en principoj determinas la rajtojn kaj devojn de la laboruloj kaj laborejoj, ekvalidas ekde la 1-a de Januaro 1968. Same la Leĝo III. de 1967 pri terkultura produkta kooperativo.

MALLONGE...

D-ro L. Márton, II-a sekr. kasisto de IEAJ, redaktoro de „Internacia Jura Revuo”, en Septembro faris viziton en Leningrad (Sovetunio) ĉe Esperanto-Rondo de Domo de Amikeco kaj Paco (Fontanka 21). Tiuokaze li faris prelegon pri „Kosma Spaco kaj Juro”. La kontakto, kiun d-ro Márton havis kun la gvidantoj — s-roj Prof. S. N. Podkaminer kaj G. N. Teterin — de la E-Movado, sendube helpas al plua disvastigo de la Internacia Lingvo, en ĉi tiu vasta lando.

☆

D-ro L. Röhl, I-a sekr.-kasisto de IEAJ, en Oktobro profitis sian viziton en Berlin (Okcidenta) por nia Asocio, kaj havis okazon detale preparoli diversajn aferojn de IEAJ kun ties vicprezidanto s-ro E. Stolpe.

☆

En Germana Demokratia Respubliko la popola parlamento akceptis novan Konstitucion, kiu ekvalidis la 9-an de Aprilo 1968. En la prepara periodo okazis

750 000 aranĝoj por larĝa diskuto, kiujn partoprenis 11 milionoj da loĝanto. Dum la diskuto oni donis 12 454 proponojn al la projekto. (94,49% de loĝantaro jese voĉdonis la projekton de la konstitucio dum la referendumo.) La Konstitucio dividiĝas en Kvin Partoj kaj havas 10 Ĉapitrojn kaj 108 Artikolojn.

☆

En urbo Barnaul (Soveta Unio) specialan Esperanto-kurson gvidas s-ro Genadij Ŝilo por 30 gejuristoj. Inter ili estas: juĝisto, prokuroro, advokato k. a.

Lastmomente atingis nin la trista sciigo pri forpaso de

D-RO WILHELM HERRMANN

estinta vicprezidanto de IEAJ, kaj ĉiam tre aktiva membro de nia Asocio.

Lian memoron ni gardas inter ni. Al lia familio ni peras sinceran kondolencon de ĉiu membro de IEAJ.

La Ŝtataneco en la Juro de Norvegujo

La unua leĝo pri ŝtataneco en Norvegujo datiĝas de 1888. Antaŭ tiu tempo ĉiuj, kiuj havis kontinuan loĝejon en la lando, estis civitanoj laŭ la domicila principo.

La leĝo de 1888 diferencigas inter enloĝantoj kaj ŝtatanoj, kaj estas bazita sur la devena principo. Same faris ankaŭ la postaj leĝoj de 1924 kaj 1950.

Estas necese substreki, ke oni ne donis al la nomitaj leĝoj retroaktivan forton. Tial juristoj devas havi almenaŭ iun sciigon ankaŭ pri la malnovaj reguloj. Tamen, tie ĉi mi pritraktas ĉefe nur la leĝon de jaro 1950.

1. a) Infano ricevas norvegan ŝtataneco post la naskiĝo, se ĝi estas naskita en edzeco kaj la patro estas norvega ŝtatanano.

Infano naskita ekster edzeco ricevas norvegan ŝtataneco, se ĝia patrino, kiu havas la gepatran povon, estas norvega ŝtatanino.

Se norvega viro kaj eksterlanda virino kune havis infanon antaŭ ilia geedzeco, la infano ricevas norvegan ŝtataneco, kiam la gepatroj geedziĝas. La kondiĉo estas, ke la infano estas needziĝinta kaj havas malpli ol 18 jarojn.

Adopto ne kaŭzas, ke la infano aŭtomate ricevas la ŝtataneco de la adoptaj gepatroj.

1. b) Eksterlandano rajtas peti pri norvega ŝtataneco. La peton li sendas al la departemento por juraj aferoj. La kondiĉoj por fariĝi norvegano, estas jenaj:

1. li havas minimume 18 jarojn;
2. li havis konstantan loĝejon en la lando dum la lastaj 7 jaroj;
3. lia konduto estas bona;
4. li eblas nutradí sin mem kaj sian familion.

Se la petanto iam estis norvega ŝtatanano, li povas akiri ŝtataneco, eĉ se li ne kontentigas la supre menciitajn kondiĉojn. Same validas koncerne eksterlandan petanton, kiu loĝas kune kun sia norvega edzo.

Se la petanto akiras permeson, la departemento informas lin, ke li ricevos la ŝtatan dokumenton, kondiĉe, ke li antaŭ juĝisto ĝis unu jaro promesas fidelecon al la konstitucio.

La departemento havas apartan petskemon, sed oni ne devas uzi ĝin. Se la peto estas rifuzata, la petanto pagas nenion. Se li akiras permeson, li pagas 100 norvegajn kronojn (ĉ. 14 dolarojn). Ĉiujare ĉ. 600 eksterlandanoj fariĝas norvegaj ŝtatananoj.

2. a) Laŭ la ĉefregulo oni perdas sian norvegan ŝtataneco, se oni ricevas ŝtataneco en alia lando „post peto aŭ post ekspresa konsento”. Tiu ĉi regulo povas konduki al duobla ŝtataneco, nome se li ricevas ŝtataneco en la fremda lando sen propra kunlaboro. En tiu kazo

li konservas sian norvegan ŝtataneco. Nur se li fariĝas fremda ŝtatanano „post peto aŭ post ekspresa konsento”, li perdas sian norvegan ŝtataneco.

Same validas tio, se norvega virino edziniĝas kun fremda ŝtatanano. Povas esti, ke ŝi laŭ la leĝo de lando de sia edzeco ricevas ŝtataneco tie. Tamen, tio ĉi ne kondukas al perdo de sia norvega ŝtataneco. La fremda ŝtataneco estas en tiu kazo ne ricevita „post peto aŭ post ekspresa konsento”.

2. b) Norvega ŝtatanano, kiu petas tion, povas esti liberigita de norvega ŝtataneco, se li estas ŝtatanano en alia lando. Se la petanto ankoraŭ ne havas fremdan ŝtataneco, la kondiĉo estas, ke li ricevas tian ĝis certa tempolimo.

3. Ordinare, la ŝtataneco de la gepatroj estas decida por la ŝtataneco de ilia infano se, la infano havas malpli ol 18 jarojn.

Laŭ la leĝo de 1924 eksterlanda virino ricevas norvegan ŝtataneco, se ŝi edziniĝas kun norvega ŝtatanano. Kaj dum la geedzeco la ĉefregulo estas, ke ŝanĝoj en la ŝtataneco de la edzo ankaŭ havas efikon por la edzino.

Laŭ la nova leĝo la geedzeco estas sensignifa por la ŝtataneco de la edzino. Ŝi ricevas kaj perdas ŝtataneco tute sendepende.

4. Laŭ la leĝdonintoj oni devus eviti duoblan ŝtataneco, sed ni vidis, ke eĉ la nova leĝo ne strikte sekvas tiun ĉi principon.

5. Estas notinde, ke ankaŭ la nova leĝo estas rezulto de kunlaboro inter Danujo, Svedujo kaj Norvegujo.

Dum la ellaborado de la leĝo, oni diskutis la demandon: ĉu oni devus krei komunan nordan ŝtataneco. Oni tamen trovis, ke la tempo ankoraŭ ne estis matura por tiaj radikalaj ŝanĝoj. La leĝo anstataŭ havas regulojn kun pli limigita amplekso, kiu emfazas naskiĝon aŭ restadon en alia norda lando aŭ ŝtataneco tie. Tial ordinare estas pli facile por nordanoj ol por aliaj fremduloj ricevi norvegan ŝtataneco.

6. Nur norvegaj ŝtatananoj havas voĉdonrajton kaj povas esti parlamentanoj.

Ordinare nur norvega ŝtatanano rajtas fariĝi publika oficisto aŭ laika acesoro en tribunaloj.

Norvega ŝtatanano ne povas esti ekzilita aŭ rifuzita. Laŭ la leĝo pri ellivero de krimuloj tiaj personoj ne povas esti elliveritaj escepte en kelkaj kazoj al niaj nordaj najbaroj.

Rilate al ekonomiaj trajtoj, enloĝantoj ordanire estas egaligitaj kun ŝtatananoj, sed koncerne koncesion por aĉeto de bieno la ŝtatananoj havas certajn privilegiojn.

La Ŝtataneco en la Juro de Pollando

En Pola Popola Respubliko ĉiuj problemoj pri ŝtataneco estas reguligitaj (krome per internaciaj konvencioj) per „La Leĝo pri la Ŝtataneco” (de 15. 2. 1962).

Normoj de ĉi-tiu Leĝo estas gvidataj per ĉefaj principoj de pola juro: la egaleco de rajtoj de ĉiuj homoj, sendepende de iliaj nacieco, raso, religio, instruiteco kaj sekso. Sekve ĉiuj reguloj pri ŝtataneco, koncerne la polan ŝtatanon rilatas ĉiujn polajn ŝtatanojn senescepte, reguloj, kiuj koncernas fremdajn ŝtatanojn, koncernas ĉiujn fremdajn ŝtatanojn, ne gravas de kiu ŝtato estas ilia ŝtataneco. Tiuj reguloj estas jenaj:

Akiro de ŝtataneco

Pola ŝtataneco povas esti akirata aŭ per laŭleĝaj kaŭzoj (A) aŭ per administra decido, laŭ peto (B).

A) Laŭleĝe oni akiras polan ŝtatanecon per naskiĝo (I) kaj en difinitaj kazoj laŭvole (II).

I. 1. Ĉiam akiras polan ŝtatanecon infano, se la gepatroj estas polaj ŝtatanoj.

2. Same, se unu el la gepatroj havas polan ŝtatanecon kaj la alia estas nekonata aŭ senŝtataneca.

3. Ankaŭ same, se ambaŭ gepatroj estas nekonataj aŭ senŝtatanecaj, kaj naskiĝo okazis sur la pola teritorio (aŭ infano estas trovita sur tiu teritorio).

II. Aliaj kazoj de akiro de ŝtataneco rilate de naskiĝo aŭ geedziĝo dependas de volo kaj elekto:

1. Infano, kies unu el la gepatroj havas polan, sed la alia nepolan ŝtatanecon, estos pola ŝtatano, se gepatroj dum tri monatoj post naskiĝo ne deklaras, ke ili elektas la alian ŝtatanecon por sia infano. (En kazo de malkonsento inter gepatroj decidus verdikto de juĝo.)

2. Sed infano, kies gepatroj elektis la alian ŝtatanecon por ĝi, povas akiri polan ŝtatanecon per deklaro post atingo de la 16-a jaro de sia vivo — ĝis tri monatoj post plenaĝo (laŭ pola juro 18 j.).

3. Ankaŭ laŭvole per deklaro povas akiri polan ŝtatanecon virino, kiu edziniĝis al pola ŝtatano (dum 3 monatoj post geedziĝo).

4. Virino, kiu perdis polan ŝtatanecon edziniĝinte al nepola ŝtatano, povas reakiri polan ŝtatanecon ankaŭ per deklaro, se tiu geedziĝo ne plu daŭras.

En tiuj ĉi kazoj sufiĉas la deklaro kaj administra decido alprenanta tiun deklaron por akiri polan ŝtatanecon.

5. Polan ŝtatanecon akiras ankaŭ personoj de pola nacieco aŭ poladeveno, kiuj havante registaran perme-

son, venas Pollandon por ĉiama restado — tiu ĉi kaze sen speciala administra decido koncernanta ŝtatanecon.

B) Tia decido estas necesa en aliaj kazoj:

1. Ĉiu fremda ŝtatano povas akiri polan ŝtatanecon per decido de la Ŝtata Konsilantaro. (Laŭ pola juro la Ŝtata Konsilantaro estas kolektiva ĉefo de la ŝtato.)

Antaŭkondiĉoj estas: 5-jara loĝado en Pollando kaj prezento de atesto, ke la petanto perdis fremdan ŝtatanecon. Sed tiuj kondiĉoj ne estas absolutaj. En moti-vigitaj kazoj la Ŝtata Konsilantaro povas liberigi la petanton de ambaŭ menciitaj antaŭkondiĉoj.

2. Pli facile povas akiri polan ŝtatanecon sen ŝtatanecaj personoj, se ili loĝas dum 5 jaroj en Pollando, — sufiĉas decido de Popola Konsilantaro ĝusta por la loko de loĝado.

Perdo de ŝtataneco

Supre estas montritaj ĉiuj eblecoj de akiro de pola ŝtataneco. Nun pri la perdo. Perdi ĝin oni povas en difinitaj kazoj laŭvole (A) aŭ per administra decido (B).

A) Volo de perdonto estas bezonata en kvar kazoj:

1. Infano, kies unu el la gepatroj havas fremdan ŝtatanecon, povas elekti tiun ĉi fremdan ŝtatanecon (post atingo de la 16-a jaro de sia vivo), perdante polan ŝtatanecon.

2. Virino, kiu pro geedziĝo akiras fremdan ŝtatanecon, povas deklari, ke ŝi volas perdi polan ŝtatanecon.

3. Tio ĉi koncernas ankaŭ virinon akirinta polan anecon per geedziĝo, kiu ne plu ekzistas.

En tiuj ĉi kazoj sufiĉas deklaro kaj administra decido alprenanta tiun deklaron.

4. Se pola ŝtatano akiras fremdan ŝtatanecon laŭ peto kun konsento de pola registaro, li samtempe perdas la polan.

B) Senigi de pola ŝtataneco povas la Ŝtata Konsilantaro nur personon, kiu senĉese restadas eksterlande, en precize priskiribitaj kazoj. Nome, persono, kiu:

- rompis devon de fideleco al Pola Popola Respubliko;
- agis domaĝe al ĝiaj gravaj interesoj;
- eliris eksterlanden ne laŭleĝe post la 9. 5. 1945;
- rifuzis reveni Pollandon malgraŭ la alvoko;
- rompis lian devon de militistara servo, aŭ
- estas kondamnita pro gravaj ordinaraj krimoj aŭ rekulpe.

Reguloj pri familioj

Kiel ni vidas el menciitaj normoj, pola leĝo pri ŝtataneco observas la regulon de unueco de familio, sed sen rompo de individua volo kaj egalrajto sendepende de sekso.

Pollando ratifis ankaŭ la „Konvencion pri ŝtataneco de edziniĝintaj virinoj”. (New York, 20. 2. 1957.)

Reguloj pri duobla ŝtataneco

Laŭ pola juro ne estas eble havi samtempe fremdlandan kaj polan ŝtatanecon. Se laŭ pola juro persono estas pola ŝtatanano, li (laŭ pola juro) ne havas iun alian ŝtatanecon.

En kazo, se eksterlandano havas pli ol unu fremdan ŝtatancon, pola leĝo kaj juroscienco rekomendas apliki principon de „aktiva ŝtataneco”.

Pollando ratifis la „Konvencion pri kolizio de leĝoj pri ŝtataneco kaj pri senŝtataneco” (Hago, 12. 4. 1930), kaj du aliajn konvenciojn: „Pri reguligo de ŝtataneco de personoj kun duobla ŝtataneco”: polan—hungaran (Budapest, 5. 7. 1961) kaj polan—sovetunian (Varŝovio, 21. 1. 1958).

Aliaj problemoj

Laŭ pola juro ĉiuj ratifitaj internaciaj konvencioj estas validaj kiel leĝo. Tio koncernas al ĉiuj menciitaj konvencioj kaj ankaŭ al „Konvencio pri ŝtataneco” (Roma, 6. 4. 1922). Ĉiuj normoj de la „Leĝo pri ŝtataneco” kaj ilia interpretado akordas kun la reguloj kaj principoj de tiuj konvencioj.

Generala signifo de ŝtataneco

Ĉiuj ŝtatanoj de la Pola Popola Respubliko ĝuas multajn rajtojn garantiitajn laŭ la Konstitucio. Ne ĉiujn tiujn rajtojn posedas eksterlandanoj — ekzemple rajto de voĉdonado, de laborado en profesioj rezervitaj por polaj ŝtatanoj ktp. La ŝtataneco estas fonto ne nur por rajtoj, sed ankaŭ por devoj kiel: devo de fideleco al Pola Popola Respubliko, devo de militservo kaj defendo de la Ŝtato, devo de gardo kaj fortigo de sociala proprietajo. Sed, kiel mi jam menciis, ĉiuj devoj kaj rajtoj koncernas same polajn ŝtatanojn kiel fremdajn ŝtatanojn sendepende de nacieco, raso ka¹ religio, ĉar tiaj ja estas fundamentaj reguloj kaj principoj de la pola juro.

OPINIO...

„... mi deziras al vi, ke via tre interesa revuo plej baldaŭa presforme estu eldonata.”

S-ino M. Kolinska — Szczecin —

☆

„... laŭ la subskriboj de enpresataj artikoloj estas tre interesaj en via revuo.”

S-ino Elsa Gruhle — Leipzig —

☆

„Ni eluzas la okazon por sincere gratuli vin pro la bonega ideo eldonadi la „Internacia Jura Revuo”-n, kiun vi redaktas, kaj kiu estas fakte gravega kontribuo al la faka kaj scienca kampo de Esperanto.”

Tomas Balda — Revnice —

☆

„Kun granda ĝojo mi ricevis la unuan kaj duan numerojn de „Internacia Jura Revuo”. Mi kore ŝatas ĝin, ĉar pere de ĝiaj tere interesaj artikoloj oni povas ekoni pri diversaj homaj problemoj kaj internacia juroscienco. Do, mi tutkore gratulas vin, kaj mi deziras al vi ĉion bonegan kaj sukcesplenan.”

S-ino A. Avarvari — Braŝov —

☆

„Mi fieras pri mia membreco en la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Fakte mi enhavigas la asocion inter la juristaj asocioj, kiu havas mian nomon en la adresaroj profesiaj. Alivorte mi ŝatas, ke miaj kolegoj en jurlernejoj scias, ke mi estas membro de nia grupo. Ankaŭ mi legas la „Internacia Jura Revuo”-n kun granda intereso. Mi tradukas buŝe artikolojn, pri kiuj mi opinias, ke miaj studentoj interesiĝos.”

Prof. Kevin Sheard — Cleveland —

„Ĉoje mi konstatas, ke la „Internacia Jura Revuo” estas tre interesa por la aktivaj esperantistoj-juristoj kaj estas tre bele zorgema.”

D-ro Imre Bazsó — Békéscsaba —

☆

„Sincere mi salutas kaj multan sukceson al via meritplena laboro deziras pro la „Internacia Jura Revuo.”

D-ro Josef Fousek — Prelouc —

☆

„Kun granda danko mi ricevis viajn du ekzemplerojn de „Internacia Jura Revuo”. La artikolo „Kosma Spaco kaj Juro” tre interesas min, ĉar la astronomio estas mia hobiaj.”

Arnold Zenkert — Potsdam —

☆

„Mi regule ricevas la „Internacia Jura Revuo”-n, kiu estas tre interesa por mi.”

Andrej Kamburov — Sumen —

☆

„Ni, ĉiuj esperantistoj-juristoj en Barnaul, treege dankas vin pro via atento al ni. Kun granda ĝojo ni ricevis de vi kelkajn numerojn de „Internacia Jura Revuo”, nome 6 ekz. de unuaj numeroj kaj 4 de duaj numeroj.”

Genadij Ŝilo — Barnaul —

REDAKTORA NOTO

Bonvolu priatenti, ke

- ĉiuj artikoloj devas esti tajpitaj, aŭ skribitaj per bone desegnitaj literoj, nigrakolore, sur blanka papero de formato internacia A4, nur sur unu flanko de la folioj kaj kun sufiĉa margeno;
- preferinde sendu 2 ekzemplerojn de viaj artikoloj, kaj evitu tro longajn dokumentojn.

RALPH R. HARRY

ambasadoro de Aŭstralio (Bruxelles)

LA INTERNACIA REĜIMO DE ANTARKTO

En la jaro 1956. Prof. D-ro I. Lapenna prave diris en sia prelego „La Maro en Internacia Juro” al la Internacia Somera Universitato en Kopenhago (Danlando), ke „diference de Arkto, la reĝimo de Antarkto ankoraŭ ne estas reguligita”. Dum la postaj dek jaroj estis grava evoluo en la direkto de tia reĝimo.

En tiu prelego, kiu troviĝas en la Scienca Revuo, Vol. 9-a, je paĝoj 14 ĝis 25, D-ro Lapenna diris: „Tie (en Antarkto) la teorio de sektoroj ne estas aplikebla, ĉar fakte Antarkto estas ĉirkaŭita de oceanoj. Diversaj ŝtatoj deklaris siajn postulojn rilate Antarkton, precipe Usono (!), Britujo, Francio, Norvegio, Aŭstralio, Argentino, Novzelando kaj Sovetunio (!)”.

La kontinento Antarkto estas grava ne nur el strategia, sed ankaŭ el meteorologia kaj precipe ekonomia vidpunktoj. 90% de la ĉasado al balenoj efektiviĝas en la akvoj de Antarkto. Tiurilate estas bone rememorigi, ke en 1946, estis farita internacia konvencio pri la kaptado de balenoj kun la partopreno ankaŭ de Sovetunio.

Dum la pasintaj dek jaroj la nacioj kun interesoj en Antarkto faris grandajn paŝojn en la direkto de internacia reĝimo. En tiu grandega regiono la nacioj harmonie kunlaboras kaj starigis tre interesan reĝimon juran kaj praktikan. Fakte, la historio de la Antarkta Traktato estas unu el la plej esperigaj ĉapitroj en la postmilitaj internaciaj rilatoj.

1. Teritoriaj pretendoj en Antarkto

Fakte nur sep ŝtatoj havas pretendojn pri teritorioj en Antarkto: Argentino, Aŭstralio, Britujo, Francujo, Ĉilio, Norvegujo kaj Novzelando.

Argentino, Britujo kaj Ĉilio asertas rajtojn en la sektoro sude de Sudameriko. Norvegujo pretendas la landon **Dronning Maud**, sude de Afriko. La Aŭstralia Antarkta Teritorio situas sude de la Hinda Oceano kaj Aŭstralio. **Terre Adélie**, la Franca Teritorio okupas kion en la Aŭstralia Teritorio. La **Ross Dependency** (Dependaĵo) de Novzelando estas sektoro sude de tiu lando.

Por subteni siajn pretendojn, tiuj ŝtatoj uzas diversajn jurajn argumentojn.

Argentino kaj Ĉilio substrekas siajn historiajn rajtojn kaj historiajn antaŭaĵojn, ekzemple la papajn buleojn kaj la **Traktaton de Tordesillas** de 1494. Ili ankaŭ fidis al la principo „*uti possedetis*”, kaj la fakto, ke ili sekvis kaj akiris la rajtojn de Hispanujo. Ĉar ili pre-

tendas, ke pro tiu historia sekvo ili proprietas jam dum jarcentoj, Argentino kaj Ĉilio ne faris proklamon de suvereneco kiel aliaj pretendoj.

Britujo, en memorando al la Internacia Kortumo en 1956, respondis al tiu argumento, ke

1. Hispanujo ne havis proprieton en Antarkto,
2. Argentino kaj Ĉilio elmontris neniun agadon suverenecan en Antarkto post sia sendependiĝo (1816—1818).

La brita memorando citis la decidojn de la Internacia Kortumo pri la insulo **Palmas** (1928), la insulo **Clipperton** (1931), **Orienta Gronlando** (1938) kaj **Minquiers** kaj **Ecrehos** (1958) por pruvi, ke la britaj formalaj ekokupaj agoj kreis komencajn rajtojn pli bonajn ol la pretendajn rajtojn historiajn kaj geografiajn de Argentino. La brita registaro asertis, ke „en okazo de disputo, la unuaranga provo de ŝtato en kaj rilate la disputatan teritorion dum la koncernaj periodoj”.

Aŭstralio, Britujo kaj Francujo emfazis la eltrovon de teritorio kiel apartan bazon de proprieta rajto. Aŭstralio ekzemple citas la eltrovojn de **Sir Douglas Mawson** en la jaroj 1911 ĝis 1914, kaj la aŭstraliaj ekspedicioj en 1929—1931 kaj pli poste. Norvegujo nuance diris, ke eltrovo donis nur rajton de antaŭeco por poste akiri suverenecon por koloniado aŭ alia metodo rekonata de internacia juro. (Kutime Britujo kaj Aŭstralio aldonis al ektrovo, kiel radiko de proprieto, formalan aneksagon, antaŭe aprobita aŭ poste ratifita de la registaro.) Ekzemple la brita—aŭstralia—novzelanda ekspedicio de 1929—1931 estis rajtigita starigi la britan standardon kaj deklami la aneksan proklamon en teritorioj antaŭe nekonataj aŭ ektrovitaj de britoj, kaj ne sub la suvereneco de kiu ajn ŝtato. La proklamoj asertis, ke Britujo tiel akiris plenan suverenecon. (Tiu proklamoj indikis intencon aserti rajtojn suverenajn. La brita kaj aŭstralia registaroj asertis, ke la proklamoj plenumis la postulojn de internacia juro pri okupado de teritorio en la specialaj cirkonstancoj de Antarkto.) En 1933, kiam Britujo transdonis siajn rajtojn al Aŭstralio, kaj la aŭstralia parlamento akceptis leĝon pri la administrado de la teritorio, la Aŭstralia Ministro pri Justico diris, ke la esplorado de la regiono kaj la proklamoj plene starigis britan suverenecon.

La juristoj kaj la tribunaloj multe diskutis pri la demando, el kio konsistas okupado, sed estas neniuj de-

cido de internacia tribunalo rilate al okupado en Antarkto.

Kelkaj asertis, ĉar Antarkto ne taŭgas por koloniigo, suverenco ne eblas, ke Antarkto ne estas „terra nullius” (nenies tero), sed „res communis” (komunaĵo, kozo komuna).

La usona registaro, kiu ne trudis proprajn oficialajn pretendojn, iam asertis (kvankam poste ne insistis), ke „fakta enloĝado”, kun „daŭra enloĝantaro”, estis necesa por subteni propriet-petendon.

La aŭstralia registaro, aliflanke diris en 1954, ke „okupado kaj administrado estas interpretitaj elaste en polusaj regionoj pro la geografia kaj klimataj kondiĉoj”.

Tamen ĉiuj pretendantoj pliintensigis sian esploran kaj sciencan agadon, kaj akceptis diversajn leĝojn pri la jura reĝimo kaj administrado de la koncernaj teritorioj. Post la dua mondmilito ili ankaŭ starigis konstantajn bazojn sur la kontinento, en kiuj dekoj da sciencistoj kaj esploristoj pasigis la longajn sensunajn antarktajn vintrojn.

2. La Antarkta Traktato — Fruaj Ideoj

Fruaj Sugestoj de Interaciigo: Ekde 1947 diversaj organizaĵoj, ekzemple la Virina Ligo Internacia por Paco kaj Libereco, proponis, ke la Kuratoreca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj administru Antarkton.

En 1948 la Usona Registaro sugestis al la sep ŝtatoj, kiuj havis pretendojn pri Antarkto, multŝtatan regnadon de Antarkto, en kiu Usono mem partoprenus. Sed nur Britujo kaj Novzelando esprimis definitivan intereson pri tiu sugesto. La Aŭstralia Ministro pri Eksterlandaj Aferoj diris, ke „kio necesas, estas rezona propono, kiu konservu suverenecon, inkluzive aŭstralian suverenecon, super Antarkto, sed kun interhelpo de la koncernaj ŝtatoj por la disvolvo de la Antarkto-kontinento”.

Estis aliaj provoj en la jaroj kvindekaj por internaciigi Antarkton. Novzelando kaj Hindujo sugestis, ke la antarkta kontinento fariĝu kuratora teritorio de Unuiĝintaj Nacioj. Estis ankaŭ propono, ke Usono proklamu sian suverenecon super la regiono, pri kio neniu pretendis, kaj ke Usono kun Francujo, Aŭstralio kaj Novzelando starigu organon por administri la tutan regionon, al kiu kvar ŝtatoj havis pretendojn.

Neniu propono, tamen ricevis sufiĉe da subteno ĝis okazis la stimulo de la Internacia Geofizika Jaro, pri kiu bona raporto aperis en la Scienca Revuo, Vol. 9-a paĝoj 50—53.

3. La Internacia Geofizika Jaro

En Julio de 1957 komenciĝis la Internacia Geofizika Jaro, entrepreno kooperativa de tutmondaj sciencistoj por fari mezurojn, kiuj helpas pli bone kompreni la karakteron de la Tero kaj kiel tiu influas la Suno.

Kvardek nacioj partoprenis: Usono, Sovetunio, Britujo kaj ĉiu grava membro de la Brita Naciaro, Germanujo, Francujo ktp.

Ĉiujn faktojn amasigitajn oni libere interŝanĝis.

En 1956 Usono sendis ekspedicion esploran al Antarkto. En 1957 grupo de kvar provizoŝipoj kaj tri gla-

cirompantoj tie efektivigis duan preparan ekspedicion. Tiu agado bildesprime nomiĝis „Deepfreeze I.” (super-glaciigo). Ĝia ĝenerala estro estis admiralo Byrd.

Sciencistoj de multaj landoj amasigis instrumentojn, projektis instalaĵojn, kaj instruis observantojn por aliaj eroj de la programo.

Laŭ la politika jura vidpunkto la signifa fakto pri I. G. J. estis, ke la grandaj ŝtatoj: Usono kaj Sovetunio, kiuj ne havis teritoriajn pretendojn, sed kiuj ne agnoskis aŭ akceptis pretendojn de aliaj ŝtatoj, starigis bazojn en regionoj, kiujn aliaj ŝtatoj (ekzemple Aŭstralio kaj Novzelando) konsideris kiel siajn proprajn teritoriojn.

Estis „akordo inter sinjoroj”, ke por faciligi sciencan kunlaboradon, ne okazu politika agado en Antarkto dum la I. G. J., sed memevidente kelkaj bazoj restus post la fino de la jaro, kaj estis necese trovi juran solvon de la problemo.

4. La Konferenco de Vaŝingtono, 1959

Je la komenco de 1958 s-ro Harold MacMillan, ĉefministro de Britujo, post diskutado kun la ĉefministroj de Aŭstralio kaj Novzelando, anoncis, ke la tri ŝtatoj interkonsentis pri iuj fundamentaj principoj por certigi, ke Antarkto ne restu ebla fonto de internacia malakordo kaj konflikto. Tiuj principoj estis: la libera evoluo de la scienco en Antarkto, kaj la bezono certigi, ke la regiono ne estu uzata por militaj celoj.

En Majo 1958 Prezidanto Eisenhower invitis dek-unu ŝtatojn interkonsulti pri la starigo de kunaj administraj aranĝoj por certigi, ke la kontinento ne fariĝu „objekto de politika konflikto”. La ŝtatoj tuj konsentis, kaj post jaro de prepara intertraktado, la konferenco pri Antarkta Traktato kunvenis en Vaŝingtono, en Oktobro 1959.

La Konferenco estis provo starigi fundamenton por praktika solvo de situacio, kiu povus malbonigi rilatojn inter kelkaj koncernaj ŝtatoj. Evidente internaciigo de la administrado de Antarkto neeblis. Kun la escepto de Novzelando neniu ŝtato estis preta forlasi siajn teritoriajn pretendojn. Pli modesta plano estis ellaborenda. Kompreneble la intertraktado estis konfidenca, sed estas detalaj rakontoj en diversaj libroj. Unu el la decidaj konversacioj okazis en Aŭstralio, inter la aŭstralia ministro pri eksterlandaj aferoj s-ro Lasey kaj la sovetia vic-ministro s-ro Firubin dum konferenco de la Ekonomia Komisiono de Unuiĝintaj Nacioj por Azio kaj la Ekstrema Oriento. Post ses semajnoj de intertraktado kaj marĉando la Traktato estis subskribita la 1-an de Decembro 1959.

5. La Antarkta Traktato — La Realigo

Celoj

La traktato havis tri ĉefajn celojn:

a) apartigi por pacaj celoj la antarktan regionon, difinitan en la traktato, kaj tiucele organizi inspektadon por certigi observadon de la traktato;

b) faciligi kunlaboradon sur la kampo de scienca studado kaj esplorado, inter la subskribintoj kaj kun aliaj ŝtatoj, kiuj eventuale ĝin akceptos kaj subskribos;

c) „glaciigi” la ŝtaton, en kiu troviĝas la pretendoj pri suvereneco.

La Traktata Areo

La reguloj de la traktato rilatas al la areo sude de 60 gradoj de suda latitudo inkluzive de ĉiuj glacibretoj, sed ne „tuŝas la rajtojn aŭ la uzadon de la rajtoj de iu ŝtato laŭ internacia juro rilate la altajn marojn interne de la areo”.

Nemilitigo

Artikolo I. deklaras, ke „Antarkto estu uzata nur por pacaj celoj”, kaj reguligas, ke „estu malpermesitaj inter alia, kiuj ajn agoj militecaj, ekzemple la starigo de militaj bazoj kaj fortikaĵoj, milita manovrado, kaj ankaŭ la provado de kiaj ajn armiloj”. Tiu regulo estas plifortigita de Art. V., kiu eksplicite diras, ke nukleaj eksplodoj en Antarkto kaj la formeto tie de radioaktiva rubaĵo estas malpermesitaj. Sed, ĉar kelkaj ŝtatoj utiligas personojn kaj ekipaĵojn de la militaj fortoj por faciligi sian sciencan kaj esploran laboron en la sudpolusaj regionoj, Art. I. (2) entenas specialan escepton, kiu ebligas al ĉiuj ŝtatoj tion fari, kondiĉe, ke la uzo de militaj fortoj estas por subteni: „sciencan esploradon aŭ kiun ajn alian pacan celon”.

Observado

Ĉiu subskribinta ŝtato havas la rajton nomi observantojn, kiuj „havu tutan liberecon de aliro iam ajn, al iuj aŭ ĉiuj regionoj de Antarkto”. Observantoj devas esti civitanoj de tiu ŝtato, kiu nomas lin. La nomoj de observantoj estas sendendaj al tiuj aliaj partioj de la Traktato, kiuj havas la rajton nomi observantojn, kaj simila avizo estas donenda, kiam la komisiono estas nuligita.

Estas neniu vetorajto donita al la kontraktintaj partioj rilate tiun nomumon.

La rajto de aliro inkluzive la povon inspekti „ĉiujn bazojn, instalaĵojn kaj ekipaĵojn interne de tiuj regionoj, kaj ĉiuj ŝipojn kaj aviadilojn je punktoj de malŝarĝado kaj enŝipigo de kargoj aŭ personoj en Antarkto”, kiuj devas esti „ĉiam apertaj al inspektado, per kiujn ajn observantoj”. Aldone „la kontraktintaj partioj rajtas fari elaeraj observoj ĉiam ajn super iuj aŭ ĉiuj areoj de Antarkto”. Por faciligi la funkciadon de tiu artikolo, la subskribintoj konsentis doni unu al la alia antaŭvizon pri ĉiuj movoj de siaj ekspedicioj, ŝipoj aŭ ŝtatanoj irantaj al aŭ revenantaj el Antarkto, pri la ekzisto de ĉiuj bazoj en la areo okupita de siaj ŝtatanoj kaj sciigon pri ĉiuj militaj personoj aŭ ekipaĵoj sendotaj en Antarkton laŭ la escepto en Art. I.

Post ratifo de la Traktato, kunvenoj de la kontraktintaj partioj, okazintaj laŭ la reguloj de la traktato, faris rekomendojn pri la funkciado de Art. VII.

En 1961 la unua konsulta kunveno de la Antarkta Traktato okazis en Kanbero, ĉefurbo de Aŭstralio. La reprezentantoj rekomendis, ke la interŝanĝo de informo estu farata kiel eble plej frue en ĉiu jaro kaj ĉiuokaze antaŭ la fino de Novembro. Oni faris detalan liston de la klasoj de informo interŝanĝenda per diplomatiaj vojoj.

Dum la postaj jaroj, pluraj observantoj de diversaj landoj vizitis la bazojn de aliaj partioj; ĝis nun neniu raportis rompon de la traktato.

6. Jurisdikcio

Artikolo VIII. de la Traktato diras, ke kiam la kontraktinta partio nomas observantojn aŭ sciencistojn laŭ Art. III., tiuj personoj kaj eventuale membroj de iliaj staboj restos sub la jurisdikcio de sia propra jura sistemo rilate agojn aŭ forlasojn, kiuj okazas dum ili estas en la traktata areo. En kazo de disputo pri jurisdikcio en tiaj cirkonstancoj, la traktato postulas konsultadon inter la partioj. Tio estas limigita formo de persona imuneco, simila al tiu de diplomatoj laŭ kutima internacia juro kaj la Traktato de Vieno. La traktato ne priskribas detalojn, ekzemple ĉu la observantoj restas sub la leĝo de sia propra ŝtato rilate propreton aŭ kio okazas, se la nominta ŝtato nuligas la komision.

El jura vidpunkto estas interesaj la leĝoj akceptitaj de ŝtatoj, p. e. Aŭstralio por efektiviĝi Artikolon VIII. La aŭstralia leĝo (Antarctic Treaty, Act. 1960) difinas eksterŝtatan funkciadon de leĝoj aplikitaj en Aŭstralia Antarkta Teritorio rilate aŭstraliajn ŝtatanojn, nomitajn kiel observantoj senditaj kaj sciencistojn, interŝanĝitaj laŭ la Traktato, kaj iliajn stabojn, „kvazaŭ la ago aŭ neglekto estus okazinta en la Aŭstralia Antrkata Teritorio”. Simile la observantoj ktp. de aliaj kontraktintaj partioj, kiuj ne estas aŭstraliaj ŝtatanoj, estas liberaj de la jurisdikcio de aŭstralia juro, kiam ili estas en aŭstralia teritorio. Ĉi tiu sekcio (4—2) enhavas kondiĉon, ke nenio en ĝi estas interpretebla kiel antaŭjuĝanta aŭ afektanta la rajtojn aŭ uzado de rajtoj de iu ŝtato sub internacia juro rilate al altajn marojn.

7. La Rekomendoj de Konsultaj Kunvenoj

La kunvenoj de la kontraktintaj partioj en Kanbero (1961), Bonajro (1962), Bruselo (1964) kaj Santiago (1966) faris rekomendojn pri kunlaborado sur la scienca kampo, pri la kunordigo de telekomunikiloj por faciligi meteorologion kaj la prognozon de vetero, aernavigacion kaj alian agadon, kie tia kunlaborado estis konsiderata dezirinda.

El jura vidpunkto tiuj rekomendoj, kvankam unanime akceptitaj de la reprezentantoj en konsulta kunveno, restas nuraj rekomendoj al la registaroj kaj neniel estas devigaj ĝis ĉiuj kontraktintaj partioj estas ilin aprobintaj. Tion evidentigis la evoluo de rekomendoj pri la savo kaj konservado de faŭno kaj flaŭro antarktaj. La „konsentitaj rimedoj” akceptitaj de ĉiuj reprezentantoj en Bruselo en 1964 restis nedevegaj, kiam la 4-a konsulta kunveno okazis en Santiago en 1966. Ili similas al kiu ajn interŝtata kontrakto subskribita ad referendum — la kontrakto efikas nur post la ratifo de ĉiu el la 12 ŝtatoj.

Alia rekomendo de la 3-a konsulta kunveno restis neratifita en 1966 — tio estis la rekomendo, ke oni urĝu novajn subskribintojn (efektive Nederlandon, Polujon kaj Ĉeĥoslovakujon) akcepti la rekomendojn de la konsultaj kunvenoj, eĉ se ili ne rajtis partopreni tiun kunvenojn. La registaro de Usono ne ratifis tiun rekomendon kaj proponis ĉian modifon. La aliaj partioj akceptis la klarigan deklaron, sed ne deziris modifi la rekomendon, kiu do restis neŝanĝita, sed sen efike ĝis la ratifo de Usono.

La fakto, ke ŝtatoj, kiuj ratifas la traktaton, post la okazo de kelkaj konsultaj kunvenoj ne estas devigitaj akcepti la apartajn kontraktojn rezultintaj de tiuj kunvenoj, eĉ post ratifo de la 12 fondintoj, povus kaŭzi malfacilaĵojn. Ekzemple, se la rimedoj por konservado de fokoj kaj antarktaj birdoj efikiĝos, Pollando, Nederlando kaj Ĉeĥoslovakujo ne estos partioj en la akordo. Sajne ili povus akcepti per deklaro la samajn devojn. Ankaŭ ne estas tre grave, ĉar ĉiuj partioj-ŝtatoj, kiuj havas gravan esplorprogramon, estas fondintoj, partoprenas la konsultajn kunvenojn, kaj estos akceptinta la konservadajn rimedojn.

Do, la problemo estas pli teoria ol aktuala. Se necese, en la estonteco oni povus amendi la traktaton por fari deviga la akcepton de ĉiuj aktualaj kaj estontaj rekomendoj antaŭ ol ŝtato povas akcepti la traktaton mem. Multe pli grava kaj interesa de jura vidpunkto estas la akordo pri teritoriaj pretendoj.

8. La Akordo pri la Teritoriaj Pretendoj

Aŭstralia juristo (s-ro A. C. Castles) konstatis, ke „la plej impresa faro de la Antarkta Traktato sur la kampo de intenracia juro estis la akordo... en Artikolo IV.” Tiu diras:

„1. Neniu entenanta en ĉi tiu Traktato estu interprefa kiel:

a) rezigno fare de kiu ajn kontraktanta Partio de antaŭe asertitaj rajtoj aŭ pretendoj al teritoria suvereneco en Antarkto;

b) rezigno pri aŭ malpliigo de iu ajn bazo de pretendo al teritoria suvereneco en Antarkto, kiu ĝi eble havas ĉu rezulte de sia agado aŭ de la agado de siaj ŝtatanoj en Antarkto aŭ alimaniere;

c) antaŭjuĝanta la situacion de kiu ajn kontraktanta Partio rilate ties rekonon aŭ nerekonon de la

rajto aŭ pretendo aŭ bazo de pretendo de kiu ajn alia ŝtato al teritoria suvereneco en Antarkto.

2. Neniu ago aŭ neglekto, kiu okazos dum ĉi tiu Traktato validas, eĉ se estigas bazon por aserti, subteni aŭ malagnoski pretendon al teritoria suvereneco en Antarkto aŭ kreos kiujn ajn rajtojn de suvereneco en Antarkto. Neniu nova pretendo, estu asertata dum ĉi tiu Traktato validas.”

9. Kunlaborado

Tiel la rajtoj kaj pretendoj de la sep ŝtatoj estas „glaciigitaj” aŭ „dormigitaj” por la daŭro de la Traktato. Dum minimume 34 jaroj ekde 1961 la partioj de la Antarkta Traktato povos kunlabori sur la scienca kampo sen timo pri ebla malutilo al juraj pretendoj. Dum la konsultaj kunvenoj de la partioj laŭ „akordo inter sinjoroj” la partoprenantoj ne mencias suverenecon aŭ jurisdikcion. Kaj se iu delegito sugestas pri iu projekto, ke tiu eble afektus la rajton de registaroj, alia delegito certe rememorigas lin pri Artikolo IV.!

Komprenebla la pretendoj daŭrigas sian administradon, kiel en la pasinteco, eĉ ĝin pliiinstigas. Ili ne akceptas ĉiun proponon pri la kunlaborado ĉu pro la kosto, ĉu ĉar ili preferas organizi siajn servojn sur sia propra teritorio. Dum la lasta kunveno en Santiago en Novembro 1966 estis diskuto pri turistoj. Ĉu oni akordiĝu pri la traktado de turistoj? Estis landoj, kiuj dubis pri la unua projekto de rezolucio, ĉar el ilia vidpunkto ĝi ŝajnis tuŝi ilian jurisdikcion super homoj en ilia teritorio. Sed, fine oni akceptis rezolucion, kiu rekomendas al la registaroj konsulti pri turistoj-ekspedicioj, kiuj provus krei malfacilaĵojn kaj ĝenojn por la sciencaj bazoj.

Neniu povas antaŭvidi la evoluon de la venontaj tridek jaroj. Sed estas certe, ke la Antarkta Traktato estas vere interesa eksperimento sur la kampo de interŝtata kunlaborado kaj de internacia juro.

GLOSARO

baĥanalo	orgio
bizara	kiu havas strangan, fortan, sed malharmonian efekton
epitafo	tombskribaĵo
hordo	senorda trupo
kognata	familian(ar)o el la virina devenlinio
kredenci	pormeti (trinkaĵon)
langvoro	malstreĉiĝo de korpaj kaj animaj fortoj
omeno	malbona antaŭsigno
pietato	pia memoro, respekta sento pri mortintoj, relikvioj, tradicioj
prestidigito	ŝajna miraklofaro por lerta fingrouzo
prima	unua
sino	brusto, metafore: animo
skabelo	pedbenketo
varo	komercaĵo

Justicordo en la Germana Demokratia Respubliko

En la GDR la maksimumoj de la Deklaracio de Postdam estas efektivigitaj, konsekvence ankaŭ rilate al la justicoreformo. Neniu iama faŝisma juĝisto aŭ ŝtata prokuroro plu oficas. En ĉi tiuj funkcioj nun oficas ĉefe progresemaj iamaj gelaboristoj. Tio ebligis la evoluon de la progresema orda de justico, kiu bazas sin sur ampleksa kunagado de la popolo en la jurisdikcio. La decida leĝo por nia justicordo nomiĝas: „Taskoj kaj labormaniero de la justicorganoj”, kaj datiĝas de Aprilo 1963.

Multforma estas la kunagado de niaj ŝtatanoj. La skabenoj estas kiel profesiaj juĝistoj samrajtaj, kaj ili agas per diskonigo de juĝoj profilakte. Kromaj taskoj en ilia agosfero estas: eduki la leĝrompintojn kaj zorgi pri la reensociigo de punitoj post la punfino. Ĉiun juĝkunsidon partoprenas komisiitoj de la laborkolegoj, de la domkomunumo aŭ de aliaj kolektivoj, kiuj kapablas prijuĝi la akuziton. Jam dum la antaŭesploro, la polico pridemandas personojn el la menciitaj kolektivoj. La opinioj de la kolektivoj estas serioze konsiderataj de la juĝistoj en ilia decido.

Tre grava estas la institucio de la sociaj akuzantoj kaj defendantoj. Taŭgaj personoj estas proponataj de la kolektivoj, en kiu la puninda persono laboras, kie li loĝas aŭ socie kunlaboras. La juĝisto kune kun la skabenoj decidas, ĉu la proponitaj personoj estu akceptataj. Sociaj defendantoj estas proponataj, se la akuzita persono senzorge agis kontraŭleĝe, sed alie estas estiminda persono. Sociaj akuzantoj kaj sociaj defendantoj posedas en juĝkunsido la samajn rajtojn kiel la ŝtata prokuroro. La socia defendanto tie ankaŭ povas sciiĝi, ke la koncerna kolektivo, okaze de mallibereja puno, estas preta transpreni garantion por la akuzito. Cetere ankaŭ en procesoj sen socia defendanto, la juĝistoj povas dekreti garantion por la akuzito, se tion proponas la laborkolektivo. Tiuokaze la koncerna kolektivo devas provi eduke influi la akuziton certan tempon. Sociaj kolektivoj ankaŭ rajtas, okaze de antaŭtemplima elkarcerigo, transpreni garantion dum la tempo, en kiu la leĝrompinto devas bonkonduki por atingi nuligon de la restanta puno.

La juĝistoj rajtas pere de la juĝo, devigi la akuziton edukcele dum periodo ĝis du jaroj ne ŝanĝi la laborejon aŭ labori en certa laborejo (koncernas mallaboremulojn).

Se juĝisto aŭ skabenoj konstatas kritikindan labormanieron de aliaj juĝejoj aŭ ŝtatorganoj, socialismaj

laborejoj aŭ institucioj aŭ sociaj organizaĵoj, ili faras motivan, kritikantan decidon. Tio servas al la plifortigo de nia socialisma laŭleĝeco.

Ekzistas konfliktkomisionoj en laborejoj jam de post 1953. Ili bonefike traktis negravajn kontraŭleĝajn agojn de la laborkolegoj aŭ flanke de la laborejestraro rilate al la laborkontrakto. Ekde 1963 iliaj rajtoj estas multe pli ampleksaj kaj ankaŭ koncernas civilajn disputojn. En loĝdistriktoj estas fonditaj t. n. arbitraciaj komisionoj. Ambaŭ komisionoj estas elektataj kaj rajtas pritrakti krimetojn, transdonitajn al ili de la polico, ŝtata prokuroro aŭ juĝisto. En kazoj de ofendoj ili samrajte decidas, se unu el la koncernaj civitanoj tion proponas. Kiam ekagas la konfliktkomisiono, la akuzito devas aparteni al la koncerna laborejo. La cititaj komisionoj rajtas devigi la akuziton senkulpiĝi sin ĉe la domaĝon suferinto, aŭ antaŭ la kolektivo, krome ili rajtas devigi la punindan personon kompensi la domaĝon, aŭ ili povas dekreti mallauĝdon. La ofendanto ankaŭ povas esti devigata publike repreni la ofendon.

Ĉe civiljuraj disputoj pri disputvaloro ĝis 500 markoj ambaŭ komisionoj rajtas provi nedevige ordigi la konflikton inter la interesuloj. Cetere la propono pritrakti certan aferon povas esti farata ne nur de la koncernanta persono mem, sed ankaŭ de aliaj civitanoj. La konfliktkomisiono ankaŭ en tiaj disputoj nur povas okazi tiam, kiam la kontraŭulo estas ano de la koncerna laborejo.

Ankaŭ aliaj pli aŭ malpli simplaj disputoj pro malatento al rajtoj kaj devoj en la ĉiutaga vivo povas esti traktataj en tiuj komisionoj, same neplenumo de leĝaj alimentodevoj. Okaze de disputoj en domo ankaŭ la estraro de la domkomunumo povas proponi konsiladon ĉe la arbitracia komisiono. Tiu komisiono ankaŭ rajtas okupi sin pri mallaboremuloj kaj konfirmi ilian promeson, senprokraste komenci konstantan laboron. Ĝi rajtas dekreti admonon. Fine la arbitracia komisiono konsilas edukrespondecojn rilate la devojn ĉe neplenumo de lernevizito de infano. Se kulpas la edukrespondeculo, la komisiono ankaŭ rajtas dekreti admonon. La promeso plenumi la edukdevon devas esti konfirmata. La arbitracia komisiono plue rajtas konfirmi devigajn promesojn de domkomunumo, brigadoj aŭ de unuopaj personoj subteni edukrespondeculon. La arbitracia komisiono povas inviti lernantojn pli ol 14 jaraĝajn en sian kunsidon por instrui lin pri liaj devoj.

La du komisionoj ludas gravan rolon en la publika vivo kaj tre valoraj rezultoj de ilia laboro estas konstat-eblaj. La plej estimataj laborkolegoj aŭ civitanoj estas membroj de la komisionoj. Evidentiĝas okufrape, ke en la GDR la popolo mem ordigas multajn konfliktojn kaj zorgas pri la forigo de iliaj kaŭzoj. Akcentinde ankaŭ estas, ke la justicorganoj ne plu izole laboras, kiel kutime en la kapitalisma sistemo, sed interkonsente kun la parlamentanoj, sociaj organoj kaj laborkolektivoj.

Ankoraŭ estu menciata, ke ŝtataj prokuroroj jam ekde 1952 ne nur estas ŝtataj akuzantoj, sed ankaŭ estas devigataj atenti pri tio, ke la leĝoj estas observataj flanke de ĉiuj organoj, institucioj kaj laborejoj. Ĉiu civitano

rajtas sin turni al ŝtata prokuroro, se la leĝoj, i. a. laborleĝoj, ne estas atentataj.

Celo de la socialisma punplenumo estas: eduki punitojn al plenvoloraj homoj. Ŝtataj organoj zorgas pri konvena laboro, kaj se estas necese ĉe punfino aŭ antaŭtempplima elkarcerigo, pri loĝejo. Kaj neniu rajtas riproĉi la faritan krimon al la punito reveninta el la malliberejo.

La artikolo montras, ke la justica ordo en la GDR estas progresema. Ĝi garantias iom post iom la venkon super la krimeco. Ĉiam pli konstante kreskanta jurkonscio ankaŭ rezultigas malpliigon de la civilaj konfliktoj.

ROMAN SAKOWICZ
advokato (Nowa Sol)

Klopodo kun Suĉinfanoj

Sinjorinoj Anna kaj Maria kuŝis unu apud alia en la akuŝa sekcio de la hospitalo en sia ĉefurbo. En la sama tempo ili naskis filinetojn. Post mallonga tempo ili, provokitaj de la kunkuŝantaj „kunulinoj”, komencis supozi, ke iliaj filinetoj tuj post la akuŝo, estas interŝanĝitaj. La hospitala personaro atestis, ke ĉio estas en ordo: esploris la atestintajn, dum la akuŝo estintajn flegistinojn. Sed la patrinoj dum la nutrado de etulinoj kaŝe ŝanĝis la ĉifonetojn kun la nomoj de naskitaj filinetoj (kiuj estas alpinglitaj al la naskita infano post la naskiĝo), kaj la patrinoj en tiu stato forlasis la hospitalon.

Post kelkaj monatoj s-ino Anna kun sia filineto vizitis s-inon Maria kaj informis, ke ŝia edzo diras, ke la infano ne estas lia, „li tion sentas” aldonis s-ino Anna. Sed s-ino Maria protestis: „Rigardu, s-ino Anna, la infaneto havas vian nazon, orelojn, buŝojn”.

Ambaŭ virinoj studis fotojn de siaj edzoj kaj fine s-ino Anna deklaris, ke ŝi estas absolute certa, ke ŝi nutras filineton de s-ino Maria. Sed tiu lasta ne konsentis interŝanĝi la filinetojn.

S-ino Anna kelkfoje vizitis s-inon Maria kaj kelkfoje postulis interŝanĝon de la filinetoj, sed en la fino de la unua jaro ŝi komencis dubi, ĉu ŝi pravas, postulante la interŝanĝon.

Sed post kelkaj monatoj, kiam la filinetoj jam estis pli ol unu jaraĝaj, s-ino Maria siavice venis al s-ino Anna kaj diris, ke jam de kelkaj monatoj ŝi ne estas

certa, ke ŝi nutras propran infanon, kaj tiel ŝi konsentas, konforme al la propono de Anna antaŭ jaro, interŝanĝi la infanetojn. Sed s-ino Anna decide forĵetis tiun proponon, dirante, ke ŝi kaj ŝia edzo jam alĉutimiĝis al la infaneto.

Tiam s-ino Maria komencis juĝproceson.

La personaro de la hospitalo denove konfirmis, ke la infanetoj estis bone dividitaj laŭ la ĉifonetoj kun nomoj.

Poste kuracistoj per ekspertoj asertis, donante la rezultojn de esploro de la sangoj kaj mezurado antropologian.

La proceso daŭris dum sufiĉe longa tempo kaj en la fino la patrinoj, post la interkonsento, kaŝe de la tribunalo, interŝanĝis la infanetojn. Sed la juĝverdikto ne antaŭvidis tiun interŝanĝon kaj „rekonis la faktan staton”.

Sed post du monatoj, kiam la verdikto fariĝis leĝoforta, la patrinoj memvole interŝanĝis denove la infanetojn, ĉar la filinoj jam dum du jaroj alĉutimiĝis al siaj gepatroj kaj fariĝis fremdaj al la novaj.

Sed la verdikto estis transdonita al la administracia fako por ŝanĝi la nomojn de la infanoj.

Al la gepatroj ĝi deklaris, ke la naskiĝatestoj jam ne povas esti ŝanĝitaj, do restis sola eliro: denove sin turni al la juĝejo por ŝanĝi la nomojn de la infanoj per adoptado.

Tiamaniere la longjaraj klopodoj finiĝis.

Kondamno al Pago por la Bono de la Ŝtato

kiel specifa institucio de la socialisma civila juro

La ordinara jura konsekvenco de la kontraŭjuraĵaj kontraktoj, nome la senvalideco, elkreskis en la romia juro. Same en la romia juro elformiĝis ankaŭ tiuj du reguloj, kiuj — okaze de plenumo de la kontraŭjura kaj nevalida kontrakto — preskribis la restarigon de la origina stato (in integrum restitutio), aŭ se ambaŭ kontraktintoj estis kulpaj, malpermesis la restarigon de la origina stato (in pari causa turpitudinis cessat repetitio). Tiujn regulojn de la romia privatjuro transprenis ankaŭ la jursistemoj de la Eŭropaj varproduktantaj socioj, kaj tiuj ĉi normoj estas troveblaj ĝenerale ankaŭ en la privatjuro de la hodiaŭaj okcidentaj socioj. Sed en la jurfaro de la absolutismaj monarĥioj, ĉe limo de la civila, kriminala juroj, estiĝis specifa institucio, kiu ebligis forpreni la ricevaĵon donitajn surbaze de malpermesita kontrakto, por la bono de la ŝtato. Tiu ĉi jura institucio nomata konfisko aperis unuafoje en la Ĝenerala Privatjura Kodo de Prusujo (Preussisches Allgemeines Landrecht). Post du jardekoj ankaŭ la aŭstra Ĝenerala Civila Kodo de 1811 (Allgemeines Bürgerliches Gesetzbuch) donis eblecon enkasigi la plenumaĵon akiritan surbaze de malpermesita kontrakto, por la bono de la fisko. Tiun privatjuran konfiskon oni povas taksati, kiel intermiksiĝo de la feŭdala ŝtato en la proprietajrilatojn de la burĝaro strebanta supren kaj portanta la socian progreson.¹ Estas kompreneble, ke post la venko de la burĝaro preskaŭ ne estis vico apliki la regulojn de la konfisko, ĉar la ekonomia intermiksiĝo de la ŝtato plene kontraŭis al la ideoj de la liberalismo.

En la lastaj jardekoj, kelkaj reprezentantoj de la jura literaturo tamen aŭdigis sian konvinkigon, ke la forpreno de la objekto de la malpermesita kontrakto por publika celo, pli konvenas al la postulo de la justeco, ol la restarigo de la origina stato, rekte instigas la kontraktintojn por kiel eble pli rapide ricevi la plenumendaĵojn de la malpermesita kontrakto.

Per la triumfo de la socialisma revolucio en Ruslando akiris potencon tiaj sociaj klasoj, inter kies politikaj ideoj okupis centran lokon la ideo de la ekonomia gvidrolo de la ŝtato. La fundamentojn de la ekonomia influo de la ŝtato oni kreis per alŝtatigo de la plimulto de la produktiloj, per enkonduko de la planmastrumado. Pro la militaj cirkonstancoj la unuajn jarojn de la soveta ŝtatpotenco karakterizas gravaj ekonomiaj malfacilaĵoj, kaj tiuj aktivigis la por la socidangerajn personojn kaj opiniojn. Tiuj ĉi kontraŭsocialaj tendencoj validiĝis ankaŭ sur la tereno de la financa trafiko

kaj inter la kontraktaj rilatoj, kie la spekulaciistoj, sakristoj kaj uzuristoj faris malutilojn. Por la leĝfardo — realiganta la ideojn de la ekonomia potenco de la ŝtato — estis evidenta solvo, ke la partoprenantojn de la socie plej danĝeraj kontraktoj — krom la ceteraj juraj malavantaĝoj — oni punu ankaŭ per severa civiljura konsekvenco. Inter tiaj cirkonstancoj oni formulis en 1922 la 30. kaj 147. paragrafojn de la unua sovetrusa Civiljura Kodo, laŭ kiuj la plenumaĵojn donitajn surbaze de kontrakto farita por kontraŭleĝa celo, por trompi la leĝon aŭ por grave malutili al la ŝtato, oni devas enkasigi por la bono de la ŝtato. Saman juran malbonon destinis la leĝo ankaŭ al la kontraŭjure minacanta, erariginta, kun la reprezentanto de la alia kontraktanto koluzianta persono kaj al la uzure kontraktulo.

La apliko de kondamno por la bono de la ŝtato ekde la jaroj 1924—25 ĉiam pli malofte okazis en Soveta Unio, kaj por tio ĝi fariĝis escepta jurinstitucio. Sed en malampleksa rondo, en kiu ĝi ankaŭ nuntempe estas aplikebla, oni povas ĝin konsideri jurrimedo efika. Tial la sovetaĵ Civilaj Leĝofarantaj Bazoj eldonitaj en 1961. kaj konforme al tiuj, la civilaj kodoj de kelkaj federaciaj respublikoj en Soveta Unio, ĉiuj konas la kondamnon por la bono de la ŝtato. Por defendi la individuan intereson oni lasis valida la regulon, kiu ordonis konfiski de plenumitaĵojn por la kontraŭjure minacanta, erariginta kaj uzure kontraktinto, sed elinter la kontraŭleĝaj kontraktoj nur ties objektoj estas konfiskeblaj, kiuj estas faritaj intence kontraŭ la interesoj de la ŝtato aŭ la socio.

Parto de la popoldemokratiaj landoj en Eŭropo, en la tempo de la socialisma transformiĝo jam posedis civilan kodon (ekz. en Germana Demokratia Respubliko), en la alia parto la privatjuro bazis sin sur tradiciaj reguloj (ekz. Hungarujo). En tiaj landoj, kie jam ekzistis skriba privatjuro, la kondamno por la bono de la ŝtato estis transprenebla nur en la nova, socialisma civila kodo (ekz. Ĉeĥoslovakio). Sed la tradicia, sur kutimoj baziĝinta juro kreis eblecon por la juĝista jurkreo enkonduki la kondamnon por la bono de la ŝtato ankorau antaŭ la kreo de nova kodo. Tiel ekz. en Hungarujo jam ekde 1953 ni povas renkontiĝi kun juĝistaraĵaj dekretoj, kiuj je ŝarĝo la uzuristo, spekulaciisto ktp. forprenas lian laŭkontraktan plenumaĵon por la bono de la ŝtato. Kvankam ĉu en Soveta Unio, ĉu en la popoldemokratiaj landoj oni atingis konsiderindan progreson koncerne la elformon de la socialisma jurkonscio de la

civitanoj, kaj fundamente ŝanĝiĝis tiuj sociaj interrilatoj, sur kies bazo la malpermesitaj kontraktoj danĝeraj al la socio povis grandnombre naskiĝi, — la institucion de la kondamno por la bono de la ŝtato la socialismaj landoj eĉ en sia hodiaŭa ŝtato de la evolucio, ne povas malhavi. La hungara juĝista praktiko rilate la kondamnon por la bono de la ŝtato tuŝas decide tiajn malpermesitajn kontraktojn, sur kies bazo la luorajto pri loĝejo en ŝtata domo estas por mono akirebla, poste kiuj koncernas malpermesitajn ekonomiajn agadojn, respektive tuŝas tian kontrakton, kie la okulfrapan senproportiecon inter la reciprokaj plenumaĵoj kaŭzas la kreditoro per eluzo de la situacio de la debitoro. Oni povas atribui al la efiko de la favoraj spertoj, ke pluraj civiljuristoj pledis por adopti la institucion al pago por la bono de la ŝtato en la pretiĝanta Civila Kodo de Germana Demokratia Respubliko.

La civiljura leĝfarado de kelkaj socialismaj landoj koncerne la kondamnon al pago por la bono de la ŝtato, laŭesence montras konformon: efika repremo de la kontraktantoj kulpe ligantaj socie plej danĝerajn kontraktojn, helpe de forpreno de objekto respektive rekompenco de la malpermesitaj kontraktoj. Konvene al tio, la kondiĉoj de tiuj sankcioj estas miksaĵ: forpreno de la objekto de malpermesita kontrakto povas okazi nur, se la jurofendo objekte signife danĝera al la socio kondiĉe, ke la partoprenanto(j) intence ofendis la malpermeson. La danĝero de la kontrakto por la socio pretendas sindefendon de la socio, sed tiu povas esti efika nur tiam, se ĝi direktiĝas kontraŭ tiu(j), kiu(j) en nia konscio de la leĝo-ofendo, faris la kontrakton.

La gravan sociadanĝerecon de la kontrakto kiel kondiĉon de la kondamno por la bono de la ŝtato la kodoj esprimas ĝenerale tiel, ke ene de la senvalidaj kontraktoj ili fiksis tiun pli malgrandan rondon, en kiŭ la menciita sankcio esta asplikebla. La enhavon de tiu pli malgranda rondo formas du tipojn de la senvalidaj kontraktoj. La senvalidajn kontraktojn apartenantajn al la unua grupo karakterizas, ke la kontraktantoj ambaŭ strebas al celo danĝera al la socio (ekz. la kontrakto inter la subaĉetinto kaj subaĉetito). Laŭ § 30. de sovetrusa Civila Kodo de 1922. apartenis al tiu grupo kontraŭleĝaj, aŭ la leĝon fraŭde evitantaj kaj tiuj juraferoj, kiuj evidente malutilis al la ŝtato, poste laŭ la 5-a alineo de la § 14. de la Bazoj de Civila Leĝfarado de Soveta Unio kaj laŭ la koncernaj paragrafoj de la Civiljuraj Kodoj de kelkaj federaciaj respublikoj ankaŭ la jurafero kontraŭantaj la interesojn de la ŝtato kaj socio. La interpreto de la § 30. de sovetrusa Civiljura Kodo de 1922. ne estis unueca en la sovetrusa jurscienco. Kelkaj tiel opiniis, ke la menciita dispono koncernas nur tiujn kontraktojn, kiuj direktiĝas kontraŭ la fundamentoj de sovetrusa sociordo. Tamen tiu opinio fariĝis ĝusta, kiu subteris al la citita paragrafo la kazojn de la ofendo de malpermeso rilatanta al la enhavo de la jurafero. La koncernan regulon de la valida sovetrusa civiljuro — kvankam ties teksto esence diferencas de la pli antaŭa teksto — oni interpretas dumaniere en la jura literaturo. Estas kiuj konsideras aplikebla la kondamnon al pago por la bono de la ŝtato nur en kazoj de juraferoj, kiuj ofendas la pleje signifajn interesojn de la ŝtato kaj socio, aŭ la fundamentojn de sovetrusa sociordo.² Kontraŭe

aliaj opinias, ke iun juraferon faras kontraŭleĝa ĝia malpermesita enhavo de la celo.³

Diference de la sovetrusa civilaj kodoj la popoldemokratiaj landoj ĝenerale konas ankaŭ la novmaniere formulitan malpermeson de la senmorala kontrakto. (Malpermeso de la kontrakto koliziinta kun la socialisma, respektive socia kunvivado kaj kun la intereso de la laboranta popolo ktp.) En tiuj landoj do apud la strikta kontraŭleĝeco ekzistas ankaŭ alia rekte komuninteresa, objektiva kondiĉo de la kondamno por la bono de la ŝtato: la senmoraleco.

Aliajn tipojn de la objektivaj kondiĉoj signifantaj la socian danĝerecon de la nun preparolita kontrakto formas tiuj senvalidecaj kaŭzoj, kiujn realigas nur unu kontraktulo je malprofito de la alia (ekz. erarigo, kontraŭjura minaco, uzuro). El inter la kontraktantoj nur tiu estas kondamnebla al pago por la bono de la ŝtato, kiu realigis la kaŭzon de la senvalideco je malprofito de la alia kontraktulo.

En ĉiu lando konanta tiun ĉi jurinstitucion, estas komuna kaj baza kondiĉo krom la kontraŭsocialieco la intenco de la nevalida kontraktanto. La kulpa konduto kiel kondiĉo al kondamno por la bono de la ŝtato ne ŝajnis senduba al § 30. de sovetrusa Civila Kodo de 1922., sed la juĝistara praktiko postulis kiel kondiĉon ekde la komenco, la kulpan konduton al la apliko de la menciita jura sankcio kaj tiu ĉi praktiko post certa hezitado fariĝis regulo. La solvo de la nuntempe valida sovetrusa juro elformis en la jura literaturo tiun unuecan opinion, ke la kondamno al pago por la bono de la ŝtato estas aplikebla nur en kazo de kulpeco. Simila estas la starpunkto ankaŭ la bulgara juro, kaj en la hungara juro ĉu dum la tempoj de la kodifo de la Civila Kodo, ĉu pli post la aŭtoroj konsideris la kulpecon (intencon, fraŭdon) kiel nepra kondiĉo de la kondamno por la bono de la ŝtato.⁴

Koncerne la esencon de la kondamno por la bono de la ŝtato la civiljura leĝfaradoj solvoj en kelkaj socialismaj landoj montras ja kongruon, tamen en la detaloj oni povas sperti signifajn diferencojn.

(Daŭrigota)

NOTOJ:

¹ L. Asztalos: Sankcio en la civila juro. Akademia Eldono, Budapeŝto, 1966, p. 242.

² M. Gureviĉ: Sovjetskaja Justicija, 1966/4., p. 22.

³ V. K. Rajher-S. N. Bratus: Aktualaj demandoj de la sovetrusa civila juro, Juriliteratura Eldono, Moskva, 1961, p. 53. V. Saĥmatov: Eksterlanda Jura Artikolkolekto, 1965, p. 480.

⁴ L. Asztalos: Jursciencia Bulteno, 1962, p. 355.

K. Benedek-M. Világhy: Hungara Juro, 1962, p. 309. Gy. Eörsi: Hungara Juro, 1958, p. 336.

M. Gureviĉ: Sovjetskaja Justicija, 1966/4.

N. Hristov: Socialisticesko Pravo, 1964/9., p. 60.

V. Saĥmatov: Eksterlanda Jura Artikolkolekto, 1965.

E. Weiss: Senvalideco de la kontrakto en la civila juro, Budapeŝto, 1965 (manuskripto), p. 837.

Ö. Zoltán: Vendo-Aĉeto kaj Interŝanĝo, Ekonomia kaj Jura Eldono, Budapeŝto, 1962., p. 118.

RAJTO DE LA INVENTINTO

Aŭtoratesto kaj patento

Aŭtoro de inventaĵo laŭ sia elekto rajtas postuli ĉu la agnoskon de nura sia aŭtoreco, ĉu tiun saman kun la prerogativo pri la inventaĵo.

En unua kazo oni donas la aŭtorateston pri la inventaĵo, en la dua kazo — la patenton.

La aŭtoratestojn kaj la patentojn oni donas, observante la kondiĉojn kaj la postulojn, antaŭvidatajn de la Regularo pri Eltrovoj, Inventaĵoj kaj Raciigaj Proponoj.

En eksterlando patentadon de la inventaĵo okazinta je la limoj de USSR kaj de la inventaĵoj produktitaj pere de sovetiaj civitanoj kaj ian ajn transdonon de la sovetiaj inventaĵoj oni allasas, observante la fiksitajn principojn de la Ministra Konsilio de USSR.

Utiligo de la inventaĵo por la posedanto de aŭtoratesto

En tiuj kazoj, kiam la aŭtoratesto estas donita pri la inventaĵo, ties rajto por utiligi ĝin, apartenas al la ŝtato, kiu prenas sur ĝin la zorgon pri ĝia realigo, konsiderante ties laŭcelan enigon. Kooperativoj kaj publikaj organizoj, sur egalaj bazoj kun la ŝtatorganizoj rajtas utiligi la inventaĵon, koncernataj en la sfero de ilia agado. En la kazo, se sia inventaĵo estas akceptita por enigi ĝin, la inventinto, depende de la ŝparado aŭ alia pozitiva efekto, rajtas ricevi la pagon kaj ankaŭ la rajton pri la privilegioj konforme al la regularo pri la eltrovoj, inventaĵoj kaj raciigaj proponoj.

Rajtoj de la patentposedanto

La patenton oni donas ekde la prezentotago de la petskribo, por 50-jara daŭro. De la sama tago estas gardataj ankaŭ la rajtoj de la deklaranto. Sen konsento de la persono, al kiu apartenas la patento — patentposedanto —, neniu rajtas utiligi la inventaĵon. Ĉi lasta povas doni la permeson — licencon — por utiligi sian inventaĵon aŭ plene cedi la patenton.

La organizo, kiu ĝis la prezento de la petskribo pri la inventaĵo, sendepende de la inventinto, praktike utiligas la inventaĵon je la limoj de USSR aŭ faris ĉiujn por tio necesajn preparojn, konservas la rajton pri ties plua senpaga utiligo. La koncernan debaton oni decidas per juĝado.

Se la inventaĵo havas speciale gravan signifon por la ŝtato, sed ne ekzistas interkonsento kun la patentposedanto rilate la patentcedon aŭ la donon de la li-

cenco, tiam laŭ la decido de la Ministra Konsilio de USSR la patenton aĉetas la ŝtato mem devige, aŭ oni la permeson povas doni al la koncerna organizo por utiligi la inventaĵon, fiksinte la pagon al la patentposedanto.

Rajtoj de aŭtoro de la raciiga propono

Al aŭtoro de la raciiga propono akceptita por apliki, oni donas la certigilon, fiksinte lian aŭtorecon. Li havas la rajton pri pago, depende de la ekonomio aŭ de alia pozitiva efekto de la proponenigo. La aŭtoro havas ankaŭ la rajton pri avantaĵoj konforme al la Regularo pri la eltrovoj, inventaĵoj kaj raciigaj proponoj.

Partopreno de la inventinto kaj raciiginto en la proponenigo

La inventintoj kaj la raciigintoj akitve devas kunhelpi la enigon kaj pluan evoluigon de siaj proponoj. Ili rajtas partopreni la realigon de la laboroj pri la enigo de ĉi tiuj proponoj, observante la postulojn, konsiderante la Regularon pri eltrovoj, inventaĵoj kaj raciigaj proponoj.

Heredo de aŭtoraj rajtoj de la inventaĵo kaj raciiga propono

La rajto ricevi aŭtorateston aŭ patenton pri la inventaĵo kaj la certigilon pri la raciiga propono, aŭ pagon de la inventaĵo, raciiga propono kaj ankaŭ la ekskluziva rajto surbaze de la patento kaj inventaĵo, herede transiras kun observo de preskribo de la leĝo.

Debatoj pri la aŭtoreco kaj pago

La debatoj pri la aŭtoreco — kunaŭtoreco — de la inventaĵo estas decidataj per juĝado. Juĝado decidas ankaŭ la debatojn pri la antaŭaĵo de la raciiga propono en tiu kazo, se tiuj ne estas deciditaj ĉe laŭloka organizo de la proponenigo.

La debatoj rilate la dimension, principojn de la kalkulo kaj limtempojn por la pago de la inventaĵoj kaj raciigaj proponoj estas decidataj kun observo de postuloj antaŭviditaj de la Regularo pri la eltrovoj, inventaĵoj kaj raciigaj proponoj. Se la inventinto kaj raciiginto konsideras la decidon malĝusta, ili rajtas fari plendon ĉe la juĝistaro.

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ)

(ALIĜINTA FAKA ORGANIZO DE UEA)

estas fondita en 1957, dum 42-a Universala Kongreso de Esperanto, en Marseille (Francujo).

El la decidoj de la fondkunveno:

1. rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al UEA kaj fariĝi fakdelegitoj pri juro;
2. aliĝi la Asocion, se eble kiel sekcion, al „International Law Association“, kaj rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al naciaj sekcioj de tiu internacia asocio de juristoj.

La celo de IEAJ estas:

- a) disvastigi la Internacian Lingvon inter la juristoj kaj antaŭenigi ĝian praktikan uzadon en la internaciaj rilatoj de juristoj;
- b) helpi la utiligon de la Internacia Lingvo por fakaj, profesiaj kaj sciencaj celoj de la membroj.

Ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu diplomiĝis ĉe Jura Fakultato aŭ samranga Alta Lernejo, kaj kiu parolas la Internacian Lingvon. Kiel eksterordinara membro povas esti akceptita ĉiu esperantisto, kiu estas studento de juro, aŭ kiu laboras en juĝejo, tribunalo, advokata aŭ notaria kancelario, aŭ en simila jura institucio. Kiel subtenanta membro povas esti akceptita ĉiu fizika aŭ jura persono, kiu per siaj kontribuoj deziras helpi la Asocion. Aliĝojn akceptas Sekretarioj-kasistoj je la subaj adresoj.

Kotizo estas 2 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro jare. Ĝi inkluzivas la abonon de la oficiala organo.

Organo fondita en 1966, dum 51-a Universala Kongreso de Esperanto, en Budapeŝto (Hungarujo), de la Asocio estas „Internacia Jura Revuo“.

Abonprezo por nemembroj: 1 usona dolaro aŭ egalvaloro jare.

Plenumkomitato por la laborjaro 1966—1969:

Prezidanto: **Prof. d-ro Ivo Lapenna**, profesoro pri Kompara Soveta kaj Orienteŭropa Juro en The London School of Economics and Political Science, Universitato de London, (Brit.).

Vicprezidantoj: **Roman Sakowicz**, advokato, **Nowa Sol** (Pollando).

Erwin Stolpe, juĝisto, **Berlin** (Okc. Germanujo).

Sekretarioj-kasistoj: **D-ro Ludwig Röhl**, notario, Friedrich-von-Teck-Str. 3. **Höchstädt**, Donau, (Okc. Germanujo),

D-ro Lajos Márton, prokuroro, Hajnóczy utca 2, **Budapest, XII**, (Hungarujo).

Publikaj Kunvenoj de IEAJ, al kiuj estas invitataj ĉiuj membroj de la Asocio, kaj kongresurbaj juristoj-neesperantistoj por pritrakti komparjuran temon, okaze de la Universala Kongreso:

Mainz (Germanujo), 1958: Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj;

Bruxelles (Belgujo), 1960: La pozicio de advokato en diversaj landoj;

Harrogate (Britujo), 1961: La respondeco de la aŭtoposedantoj;

Kopenhavn (Danlando), 1962: Evoluoj en la Soveta Juro (1958—1962);

Den Haag (Nederlando), 1964: La koncepto de proprieto kaj ĝiaj ĉefaj limigoj en diversaj landoj;

Budapest (Hungarujo), 1966: La principo de egalrajteco de seksoj en la familia juro de diversaj landoj;

Rotterdam (Nederlando), 1967: La ŝtataneco laŭ la juro de diversaj landoj.